

Esperanto-Numismatika Asocio




Esperanta Numismatiko

2023

Jarkolekto 10 - Numero 1

Jubilea jarkolekto!



ENHAVOTABELO

de januaro 2023

<i>Titolpaĝo:</i>	1
<i>Enhavotabelo</i>	2
<i>De ni por ... ni!</i>	3
<i>Moneroj & medaloj</i>	5
<i>24a Hispana Kongreso Barcelono 1963</i>	
<i>Jānis Asars (1877-1908)</i>	
<i>15a Universala Kongreso de Esperanto 1923</i>	
<i>Johann Martin Schleyer (1831-1912)</i>	
<i>Spikumajoj & suplementoj: Pri la monumento en Franzesbad (1).</i>	12
<i>Por spuremuloj! Kio estas tio?</i>	13
<i>Aspektoj de numismatiko: Trezoro el la bizanca epoko....</i>	14
<i>Valormarkoj & valorbiletoj: Sub-poŝtsignoj kun valorindikoj</i>	17
<i>Medalistoj: 32 Michal Vitanovský (°1946)</i>	18
<i>Historiaj aspektoj: Skuno “Esperanto” (1906-1921)</i>	19
<i>Terminaro: Alfabeta listo (32)</i>	21
<i>Numismatika Forumo: Artefarita lingvo laŭ Komenio</i>	22
<i>El la gazetaro: La spesmilo revizitata (Terry Watts)</i>	25
<i>Retpoŝto</i>	26
<i>Anoncoj & eventoj</i>	33

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts

Provlegado: Jozefo Horvath

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!

Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be

Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>

www.esperanto.es/biblioteko

www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*Kiu sin perdis en sia pasio,
Malpli perdis ol tiu, kiu
Perdis sian pasion.
Anonimulo*

Karaj ENA-membroj kaj aliaj legantoj!

Lasu nin, je la fino de la dua monato de 2023, denove deziri al vi ĉiuj ĉion bonan kaj al *Esperanta Numismatiko* kreskantan sukceson, informonte plejeble multajn samideanojn pri tiu apenaŭ konata aspekto de la Esperanto-kulturo, kiu antaŭ dek jaroj ankoraŭ estis malplena niĉo vualita per nebuloj.

Fine de ĉi tiu jaro ni povos senpretende anonci la dekjaran jubileon de la ENA-revuo. Tio tamen ne estas la frukto de la penado de unu sola persono, sed de multaj fervoraj kunlaborintoj. Frutempa pioniro, grandaĝe entuziasma membro de ENA, estis nia karmemora honora membro **Hans Jankowski**. Ne eblas sufiĉe honorati kaj danki lin. Senĉese kunlaboras ankaŭ **mia edzino**, zorgante pri tajpado kaj paĝaranĝo; ŝi jam dum pli ol 25 jaroj subtenas min, i.a. kiel prezidinton de la loka belga asocio “La Hirundo”. Sekve, ni ĝojas mencii nian provleganton **Jozefo Horvath** el Hungario, fakulo, kiu senĉese kaj fidele gardas kaj altigas la lingvan nivelon de la artikoloj. Li meritas nian profundan dankon! Ni menciu nian karan **Elda Dörfler**, prezidanton de la filatelista asocio Elf-AREK, kun kiu ni jam delonge intense kunlaboradas, ne nur dum la Universalaj Kongresoj, sed tagon post tago. Dankon, kara Elda!

Kaj nun mi atentigu – anonime ĉi-okaze, ĉar mi kutimas danki ilin je la fino de la koncernaj artikoloj – pri **ĉiuj membroj kaj aliuloj**, kiuj spontane aŭ responde al helpopetoj helpis nin kompletigi aŭ ilustriti tiel multe da artikoloj. Dankon al ili, laste sed ne balaste!


Ĉiu numero de nia revuo enhavas averaĝe 35 foliojn, sufiĉe abunde ilustritajn. La rezulto de serĉado, observado, legado, studado, korespondado kaj unuavice ... **pasio!** Anonccel: **oktobre 2023 aperos la 40a numero de “Esperanta Numismatiko”!**

Kiel montras la tabeloj sur paĝo 4, dum naŭ jaroj aliĝis ne malpli ol **157 individuaj** samideanoj el 44 landoj **kaj 25 asocioj** el 17 landoj. **Surprizo!** La unuan de januaro (!) 2023 ni povis jam aldoni al la listo “novalvenintoj” la nomon de nia 158a membro, el Germanio. Kaj...ĝis hodiaŭ **neniu el niaj membroj petis malmembriĝon!**


En 2023 ni celas ekprepari la kompiladon de la Unua Esperanta Numismatika Katalogo kaj de la Unua Esperanta Numismatika Nomenklatur en la historio de Esperanto. Do, ni provos finkonstrui la bazon de tiuj kompilaĵoj, sendube **la du pli gravaj projektoj de ENA**. Vi ĉiuj, fartu bone en la nova jaro! Espero kaj pasio estu niaj plej fortaj fundamentoj!

Bert


Sinoptika bilanco 2022



“ENA-landoj” kaj laŭlandaj nombroj de individuaj membroj fine de 2022
(La oficiala nomo de Makedonio estas Nord-Makedonio!)



Laŭjara nombro de individuaj membroj dum la pasintaj jaroj (2012: +2; > 2022: + 7)



Laŭlandaj nombroj de asociaj membroj, kiel universitatoj, bibliotekoj, muzeoj kaj aliaj (ne)esperantaj asocioj

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo E1 – Ordenaspektaj medaloj

24a Hispana Kongreso de Esperanto en Barcelono 1963



Lando: Hispanio

Metalo: kupro

Diametro: 24 mm (disko)

Jaro: 1963



Kvanto: *serĉata*

Pezo: 5,52 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

Averso:

supre: ruĝ-flava (= naciaj koloroj) rubandeto kun HEF-ŝildeto

ĉirkaŭskribe sur disketo: “XXIV^a HISPANA KONGRESO ESPERANTO 1963” en malhelflava ringo, ĉirkaŭe orita. Krome oritaj literoj

tutemeze: verda, orita stelo kun kronita blazoneto de Barcelono

Rimarko 1:

HEF = Hispana Esperanta Federacio

Rimarko 2:

blazono de Barcelono

Rimarko 3:

la nacia kongreso estis organizita en la kataluna ĉefurbo en la jaroj 1920, 1936, 1956, **1963**



Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

JĀNIS ASARS (1877 – 1908)



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 72 mm

Jaro: 1984

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: Jānis Strupulis

Diko: *serĉata*

Averso:

maldekstre: “JĀNIS
ASARS”

dekstre: “1877
1908”

Medalista signo: SJ 84 (kun jarindiko)

meze: busto de Asars, iome maldekstren

Rimarko 1:

Jānis Asars estis latva poeto kaj esperantisto. Krome publicisto, literatura sciencisto, literatura kritikisto, politika aktivulo kaj socialdemokrato

Rimarko 2:

de ĉi tiu medalo ekzistas ankaŭ *argilaj* ekzempleroj



Ĉu tia bela, tiu famega Belepoko?



La elstara germana verkisto Stefan Zweig [cvajg] majstre pentris en sia novelo “La nevidebla kolekto” la mizeron en Germanio post la fino de la unua mondomilito. Terure frapis en Germanio la loĝantojn la hiperinflacio, kiel en la novelo la familion de blindiĝinta fervora kolektanto de altnivelaj gravuraĵoj. Tiu familio sekve devis senĉese, unu post la alia, vendi la artaĵojn de la patro kaj decidi anstataŭigi ilin per blankaj folioj por evitigi ĉagrenon al li...

La “Granda Milito” sufokis la entuziasmon kaj la optimismon de la unua jardeko de la 20a jarcento, kaj tiu fino estis ankaŭ la pereco de la t.n. “Belepoko”, nomita tiel, post la milito, pro rerigardo al la “feliĉa infantempo”, kiam la plenkreskuloj estis ekscititaj pro la miraklaj novigoj en tekniko kaj scienco, pro la unuaj socialaj asekuroj, la unuaj balotrajtoj por virinoj k.a. Post tiu milito, en Germanio kruele furiozis inflacio kaj regreso.

Tamen, al la UK en Nurenbergo (regiono Bavario), escepte de Belgoj kaj Francoj, aliĝis popolamaso esperantista. Nur unu sola Kongreso ĝis hodiaŭ - la jubilea UK en 1987 en Varsovio- superis la rekordon de tiuj 4963 aliĝintoj de 1923! Kial? Probable ĉar, post terura epoko de militismo, imperialismo kaj ŝovinismo, esperantistoj sopiris travivi denove la tipan etoson de la internaciaj kongresoj. Tamen, tiujn -ismojn anstataŭigis en “la plej kriza jaro de la germana respubliko” anarkiismo, marksismo kaj antisemitismo.

La UK-medalo de 1923 estas “anakronismo” en la stilo de la iama Novarto, kiu furoris en la antaŭa jardeko. Tiu movado, en kiu triumfis beleco, paŝtelaj koloroj kaj luda, t.n. “serpenteca” stilo, ĉiuj inspiritaj de la naturo, estis samtempe revolucieto kontraŭ la industria produktado, kiu “elkraĉis nur samaspektajn, senanimajn uzobjektojn”. La ĝisostaj novartanoj, ankaŭ inspiritaj de la brita “Arts-and-Craft”- movado de William Morris, strebis beligi kaj harmoniigi arkitekturon kaj ĉiutagajn uzaĵojn. Tiu stilo, malgraŭ belegaj “laboristaj domoj” kiel tiu de Bruselo, tamen nur favoris la burĝajn monujojn, ĉar domoj, objektoj kaj artaĵoj estis, kaj estas eĉ hodiaŭ, ege multekostaj, do nur por burĝaj “bonŝanculoj”!

Fonto: Ziko Marcus Sikosek: “Sed homoj kun homoj – Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005”, Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 2005

Tipo A3 – Esperantaj medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

15a Universala Kongreso de Esperanto 1923



Lando: Germanio
Metalo: ferlado
Mezuroj: 30 mm x 25mm
Jaro: 1923



Kvanto: *serĉata*
Pezo: 2,19 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 0,50 mm

Averso:

supre: konstruaĵo en la germana urbo Nurenbergo, la t.n. “Kaiserstallung”, parto de la kastelo

meze: Esperanto - stelo, verde emajlita. En ĝi: “XVa”, por indiki la 15an UK

flanke: ambaŭflanke ornamaĵoj “serpentecaj” en la stilo de Novarto (Art Nouveau; Jugendstil; Secesio ...)

sube: “NÜRNBERG”

Reverso:

spegubildo, kiu montras, ke la medaleto estis stampita en la reversan flankon, do “brakteate”, t.e. per spegubilda stampilo. Tial la reverso estas konkava, la averso reliefa.

Rimarko 1:

post la stampado, al la reversa flanko estis aldonita fibolo, por ke ĝi povu esti surhavata kiel (kongres)insigno

Rimarko 2:

ferlado: tre ĉipa, maldika metalo, uzita tiam unuavice pro la hiperinflacio en Germanio sekve de la ekonomia katastrofo, kaŭzita de la teruraj financaj rekompencoj, devigitaj de la venkintoj. Tio krome kaŭzos la sekvan “ sukceson ” de la hitleranoj kaj la eksplodon de nova mondomilito fine de la tridekaj jaroj.

La ENA - redakcio elkore dankas s-inon Hauge el Nurnbergo pro la informoj pri la konstruaĵo.


Volapük kaj Esperanto



Volapük estas artefarita lingvo, elpensita en la jaroj 1879-1880 de la germano Johann Martin Schleyer. Dum unu jardeko ĝi estis ege populara kaj pli ol 100 000 personoj estus uzintaj ĝin. Post la lanĉo de Esperanto la nombro malkreskis fiaske kaj ekzistus hodiaŭ nur kelkdekaj personoj, kiuj nomas sin volapükanoj.

La vorttrezoro estis bazita sur la angla, la germana, la latina kaj la franca. Malavantaĝoj estis la malfacila gramatiko, la tro deformitaj kaj nerekoneblaj vortoj kaj la aŭtokrata sinteno de la elpensinto.


En 1887 Zamenhof eldonis sian Unuan Libron kaj sendis en la sama jaro al Schleyer sufiĉe afablan leteron en Esperanto, por anonci la lanĉon de Esperanto kaj samtempe agnoski kaj honori Schleyer pro lia projekto Volapük. La germanlingva(!) respondo de Schleyer, estis senĝena atako kaj li senrespekte kaj furioze diskreditigis la novan helpolingvon...



Fragmento de zamenhova letero en Esperanto, en kiu li afable kaj respektoplene skribis al Schleyer pri la estiĝo de Esperanto

Tipo B2 - Ne-esperantajmoneroj kaj medaloj kun esperantaj aldonoj

Johann Martin Schleyer (1831-1912)



Lando: Germanio

Metalo: bronzo

Diametro: 50 mm

Jaro: 1889 (?)

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: *serĉata*

Diko: 4 mm

Averso:

meze: busto de Schleyer, iom dekstren

supre -ambaŭflanke: JOH : MART :

ERFINDER DER

SCHLEYER

WELTSPRACHE

Reverso:

supre: palmaĵo

meze-supre: MEKOB - LA LÄBIK

KEMENIS VALIK !

meze-sube: KONSTANZ 89, 4, 15 (= dato) + subskribo de Schleyer

Rimarko 1:

la reversflanka aforismo en Volapük signifas: “MI SOPIRAS FELIĈIGI ĈIUJN PROKSIMULOJN!”

Rimarko 2:

“Erfinder der Weltsprache” = elpensinto de la mondlingvo

Rimarko 3:

Schleyer mortis en 1912, en la arĝenta, jubilea jaro de Esperanto

VARIAĴO (diferencoj diklitere markitaj!)



Lando: Germanio

Metalo: bronzo

Diametro: **27,3 mm**

Jaro: 1889 (?)

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

ĉerande: **perlorando**

meze: busto de Schleyer, iom dekstren

supre - ambaŭflanke: JOH : MART :

ERFINDER DER

SCHLEYER

WELTSPRACHE

Reverso:

ĉerande: **perlorando**

supre kaj sube: **arabeskaj ornamaĵoj kvazaŭ en la stilo de Novarto** (Art Nouveau / Jugendstil / Secesio...)

meze-supre: **MEKOB LA LÄBIK** (*vidu: rimarko 1!*)

KEMENIS VALIK !

meze-sube: KONSTANZ 89, 4, 15 (dato) + subskribo de Schleyer

Rimarko 1:


en la variaĵo mankas la strieto inter MEKOB kaj LA!

Rimarko 2:

la pendigileto supre – nedisigeble ligita al la medalo – estis celita por uzi ĝin kiel brelokon.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Pri la monumento en Franzensbad (1)



*„Foliumante en la jam aperintaj numeroj de Esperanta Numismatiko, mi trovis en la n-ro 3 de la jk. 2017 informon pri la medalo de J. Harcuba. La teksto enhavas kelkajn malprecizaĵojn kaj krome necesas ankaŭ iom klarigi la fonon de ĝia apero. La medalo **ne estis jubilea**, ĝi havis tute alian celon. Por klarigi, mi devas reveni iom en la historio de la movado.*

Komence da la 20a jarcento la esperantistoj komencis renkontiĝi, ekde la unua Universala Kongreso en 1905, sed ankaŭ nacie en naciaj kongresoj. En la habsburga monarkio okazis la unua nacia kongreso en la jaro 1910 en Vieno, la 4a efektiviĝis en la jaro 1914 en banloko Franzensbad, nun Františkovy Lázně en Ĉeĥio. Antaŭ la kongreso la prezidanto de la loka Esperanto-societo, J. Hechtl, iniciatis starigi monumenton honore al la aŭtoro de Esperanto. La monumento estis inaŭgurita ĝuste dum la kongreso. Ĝi estis la unua monumento dediĉita al Zamenhof en la mondo. La monumento staris en urba parko ĝis la jaro 1939, kiam nazioj ĝin detruis. Post la dua mondmilito reviviĝis inter ĉeĥoslovakaj esperantistoj la ideo denove starigi la monumenton. Nur post apero de Ĉeĥa Esperanto-Asocio oni serioze ekinteresiĝis pri ĝi, planinte inaŭguri ĝin en la jaro 1992. La asocio petis sian membron, akademian skulptiston J. Harcuba fari modelon de nova monumento, kion li akceptis. Sekve oni konstatis, ke la financaj kostoj por realigo superas aktualajn eblecojn de la asocio, kaj tial estis alvokita monkollektado subtene al la monumento. Tiucele la aŭtoro de la monumento preparis medalon similforman al la planita monumento kaj kontribuanto, kiu donacis iom grandan monsumon – temis pri kelkmiloj da kronoj - ricevis la tiucele presitan dankdiplomon kune kun la medalo, sur kiun estis gravurita la nomo de la donacinto. Ĝenerale la medalo estis ne aĉetebla. Tial ekzistas medaloj sen algravurita nomo, nur kiel historia artefakto. Sur aliaj estas la nomo de la donacinto. Kiom oni tiamaniere gajnis, mi jam ne rememoras, sed ĝis la planita starigo la kolektita monsumo ne sufiĉis kaj poste la nova komitato de la asocio forlasis la ideon de nova monumento.

Mi aldonas, ke okaze de la origina inaŭguro en la jaro 1914 aperis **ankaŭ insigno en formo de ordeno**, kiu nun estas ege rara. Dua noto estas, ke **ĈEA eldonis al la jubileo de Esperanto medalon de J. Harcuba**, sed tiu estas alia ol ĉi tie priskribita. Pri ĝi iam venontletere.“

Vlastimil Kočvara

Daŭrigota

La redakcia tutkore dankas s-ron Kočvara kaj scivoleme atendas la venontan leteron, por povi daŭrigi la suplementon de tiu tutnova spikumajo!!!

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni ĝis hodiaŭ scias preskaŭ nenion. Ĉu vi povus helpi la redakcion?

XXVa enigmo

Kio estas tio? Ĉu religia stampilo? Kio estas “Filartes”?



ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Arkeologio: Trezoro el la bizanca epoko

Antaŭ nelonge en la Hermona Naturrezervejo (Golana Altebenaĵo) en Palestino estis elfositaj 44 oraj bizancaj moneroj. La trezoro “dormis” dum ĉirkaŭ 1400 jaroj. Probable tiu monero estis postlasita kaŝcele je la bazo de muro el ardena gnejso. Eble iu riĉulo devis fuĝi pro atako de islamanoj, konkerantaj la bizancan Palestinon en la jaro 635.



Arkeologoj hazarde trovis la artefaktojn en la najbareco de la urbo Banias (ankaŭ: Paneas aŭ Panias), urbo kun granda historia valoro. Ĝi estis fondita en la tria jarcento antaŭ nia erao, kiel kultejo por Pajno, la greka dio de la fekundeco, duone boko, duone homo. Jena klarigo troviĝas en la revuo “Bulletin of the American Schools of Oriental Research”: “Kristanoj kredas, ke tiuloke la apostolo Petro diris, ke Jesuo estas la Redemptoro”.

Arkeologia trovaĵo estas “tempo-kapsulo” kun rigidiĝinta eventfazo, kiu ebligas imagi, kiel la posedanto de la trezoraĵoj kaŝis la monon pro minaco de milito. La tiamaj postmilitaj cirkonstancoj aŭ lia propra destino malebligis al tiu persono reakiri la trezoron.

Krom la oraj moneroj, la arkeologoj trovis ruinojn, akvokanalojn, kondukilojn, subteran fornon, por fari fajencojn, bronzaĵojn, vitraĵojn kaj metalajn objektojn.

La sciencistoj scias, ke la trezoro datas de inter la fino de la bizanca epoko kaj la komenco de la mezepoko (7a ĝis 13a jarcentoj) kaj ĝi ilustras gravan interan epokon en la historio de Levantenio. La moneroj estis pigitaj dum la epoko de la bizancaj imperiestroj Fokaso (620 ĝis 610) kaj Heraklio la Maljuna (610 ĝis 641). La plimulto de la moneroj apartenas al la epoko de Heraklio. “Ege interese estas, ke dum lia juneco nur lia propra portreto estis metita sur la monerojn, sed poste ankaŭ la bildoj de liaj filoj. Tiel eblas vidi sur la moneroj kiel elkreskis la idoj de la imperiestro”, skribas la prinumismatika fakulino de IAA, Gabriele Bijovski. Plej grave estas la fakto, ke la trovaĵo pliriĉigas la historion de la urbo Banias.

Novaj faktoj, kiel la moneroj mem, povus prilumi la ekonomion dum la lastaj kvardek jaroj de la bizanca regado. Krome, laŭ Raya Shurky, direktoro de la “National Parks Authority”, la trezoro emfazas eble konekton kun alia arkeologia evento: *“La naturrezervejo Baniyas daŭrigas surprizi nin el historia kaj kultura vidpunktoj. La ora trezoro estas samvalora kaj samnivela kiel la antaŭ nelonge tie retrovita bizanca preĝejo. La tiurilataj trovaĵoj, kiel mozaikplanko kaj ŝtono kun multaj gravuritaj krucoj pruvas, ke Baniyas estis kristana pilgrimejo.”*

Verkis: Stefanie Vroom

Elnederlandigis: Bert

Fonto: “Classical Numismatic Group, inc, cc BY-SA 2.5 / Wikimedia Commons. La teksto kun ilustraĵo aperis rete en “Archeologie Online”, kreita de la kompilantoj de “Archeologie Magazine”.

Permeson por traduki kaj montri la ilustraĵon kun mencio de la fonto kaj publikigi ilin en “Esperanta Numismatiko” ni danke ricevis de Jasper Buiting, retejestro de “Archeologie Online”.

Apendico



Ĝis hodiaŭ ENA malkovris nur unu al Esperanto ligitan medalon originan, kiu estis elfosita, aŭ eble pli ĝuste “elplugita”.

En 1999, sepdek jarojn post la enmanigo de la montrata medalo al sufiĉe konata, brita esperantisto, John Maben Warden, David Villanueva (amatorarkeologo) per metaldetektilo hazarde trovis ĝin en novalo laŭlonge de Milton Creek en Sittingbourn, Kento (Britio). La gravuritaj surskriboj tekstas jene: **“Al s-ro J. M. Warden pro lia granda servado al Esperanto”** (meze) kaj **“Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado”** (ĉirkaŭe). Sub Esperanto - steleto estas la jarindiko 1929.

Jen do, provizore, la ununura Esperanto-medalo trovita en Panjo Tero! Kiel ĝi venis tien verŝajne restos enigmo. Tiu medalo jam en 2014 estis montrita kaj priskribita de ENA en *jarkolekto unu, numero unu, sur paĝo dek!*



La *Filipina Insulara Esperanto-Asocio* vendis ilin por enkasigi monon. Anoncoj pri tiuj objektoj unue aperis en la revuo “Filipina Esperanto” en aprilo kaj majo 1908.

En tiu maja anonco legeblas, ke 500 ekzempleroj estas haveblaj (ĉu de ambaŭ tipoj kaj de la tri koloroj?). Tiuj signoj klare propagandas por Esperanto en la Insularo per sloganoj kiel “ONI PAROLAS EN ESPERANTO” kaj “ONI KORESPONDAS EN ESPERANTO”.



Ĉu la filipina anonco estis inspirita de ĉi belga anonco el la sama jaro 1908, kiu aperis en la revuo “La Belga Sonorilo” de la 21a de junio 1908? Bonvolu kompari!

Rimarku, ke la signo sur la belga propagandilo ne havas valorindikon, sed kvar steletojn kvarangule!!!

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Sub-poŝtsignoj kun valorindikoj

En sub-poŝtsignoj, speco de gluetikedoj, meze troviĝas blanka, ne uzita spaco, en kiun oni gluu poŝtmarkon. Tiu “kolumo” kun poŝtmarko estu gluata sur koverton. Tiaj kolumnoj havis specialan funkcion kiel propagandilo por reklami, varbi aŭ propagandi por iu ajn projekto aŭ politika programo.



Sub-poŝtsignoj estis ege popularaj en Eŭropo je la komenco de la 20a jarcento. En la franca oni nomis ilin “portetimbres” (poŝtmarkaj portiloj). Usonaj poŝtsignoj tradicie kaj kutime jam troviĝis sur la koverto, por ke la uzanto ne devu mem surglui ilin.

Nia neuzita ekzemplero estas verda variaĵo kun valoro de 2 spesdekoj kaj ĝi ne devenas el Eŭropo, sed el Filipinoj. En la eldonjaro 1908 ekzistis ankaŭ 4 spesdekvaloraj variaĵoj en la koloroj verda, ruĝa kaj blua.

Jen kelkaj ekzemploj de poŝtsignoj **sen valorindikoj**, kiel la plimulto de tiaj signoj.



MEDALISTOJ

32. Michal Vitanovský (*1946)



Inter 1961 kaj 1965 la artisto (fin)studis en la mezlerneja Arta Akademio de Prago, Ĉeĥio. **Tiam liaj preferataj materialoj estis ligno, metaloj, ceramiko, ŝtono kaj artefaritaj materialoj.** Finstudinte en la Universitato de Aplikitaj Artoj, li dediĉis sin al la kreado de skulptaĵoj kaj medaloj.

Li skizis ne nur medalojn pri gravaj personoj de la pasintaj jarcentoj, sed ankaŭ pri eventoj de diversaj epokoj kaj prefere pri la ina personeco, same psike kaj fizike. Li ne nur realigis stampitajn, sed ankaŭ fandverŝitajn medalojn, entute pli ol cent diversajn medalojn.

Vitanovský ankaŭ skizis ĉeĥajn monerojn laŭ komisiono de la Ĉeĥa Nacia Banko. Ses el liaj kreaĵoj gajnis premion kaj estis produktitaj ĉu en arĝento, ĉu en oro.

Unu el tiuj belegaj moneroj estas la sube montrata Komenio-medalo en oro, **kiu estos priskribata en la venonta numero de ĉi jarkolekto.**



Dum la naŭdekaj jaroj li unuafoje kreis insignojn, urbestrajn ĉenojn kaj sceptrojn por kvar universitatoj. Krome li famiĝis kiel kreinto de ampleksa kolekto de skulptaĵoj.

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Skuno Esperanto (1906-1921)



Lando: Usono

Metalo: bronzo

Diametro: 38 mm

Jaro: 1973



Kvanto: *serĉata*

Pezo: 25,2 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

ĉirkaŭe - supre: "350TH ANNIVERSARY 1623-1973" (= 350a datreveno 1623-1973)

ĉirkaŭe - sube: "GLOUCESTER MASSACHUSETTS"

meze: fragmento de mara pejzaĝo kun nuboj kaj ondoj

centre: bildo de la ŝipo kun sube nomŝildeto "ESPERANTO"

Reverso:

ĉirkaŭe - supre: "INTERNACIONAL FISHERMENS RACES" (= internaciaj fiŝkaptistaj vetkuroj)

ĉirkaŭe - sube: "SCHOONER ESPERANTO" (*la deveno de la nomdonado estas serĉata!*)

meze: "1906 / BUILT AT ESSEX / BY JAMES & TARR / DESIGNED BY / THOMAS McMANUS / TONNAGE 140-LENGTH 115' / LOST OFF / SABLE ISLAND / 1921"

Rimarko 1:

la velŝipo Esperanto estis konstruita en Essex (Usono). Ĝi pezis 140 tunojn kaj mezuris en longo 107 futojn (33 metrojn) kaj havis sian sidejon en la havenurbeto Gloucester en Masaĉuseco. Ĝi estis kromnomita “Reĝino de la nord-atlantika fiŝkaptista floto”. La skuno subakviĝis en 1921 apud la insulo Sable Island post akcidenta trafo de subakvigita vrako.

Rimarko 2:

La du-masta fiŝkaptista skuno “Esperanto” hisis plenan velaron en pluraj vetkuroj kaj estis



unu el la nur du nevenkitaj ĉampionoj ĉe la Internacia Fiŝkaptista Pokalo de Halifakso. Sub la komando de kapitano Martin Leander Welch, la skuno iĝis la unua gajninto de la Pokalo en la vetkuroj de la 30a de oktobro ĝis la 2a de novembro 1920, kiam ĝi venkis la kanadan fiŝkaptistan skunon Delawana el la havena vilaĝo

Riverporto en Nov-Skotio, sub la komando de kapitano Thomas Himmelman.

Post la impona prezento de “Esperanto” en 1920, la malvenkintaj kanadanoj en aprilo 1921 konstruigis novan ŝipon laŭ la modelo de “Esperanto”, baptitan “Blunazo”, kiu en 1963 ankoraŭfoje ekvivis kiel repliko, sub la nomo “Heredaĵo”.

Rimarko 3:



La venko de la skuno kaj la famo de la ŝipo Esperanto mem instigis artistojn krei juvelojn kun medalona aspekto por memori la nomon kaj la venkon de tiu famega velŝipo.

TERMINARO

Alfabeto listo (32)

detondaĵo: rezulto de malkompleta, erare truigita lameno je la fino de metala, ronda bendo, el kiu lamenoj estas produktataj > misstampo.

duobla stampo: se la sama lameno estas stampata dufoje, estiĝas duobla stampo. La dua ofte estas distancita je kelkaj procentoj > misstampo.

ekscentraĵo: erara rezulto pro erara fiksado de la lameno (= blanko). Tial ambaŭ flankoj estas malĝustaj > misstampo.

enmetaĵo: se dum la stampado la lameno estas fuŝe enmetata, la rezulto estas monero kun unu ekscentra flanko. La alia flanko estas ĝusta > misstampo.

entranĉo: se kroma (stampita aŭ nestampita) lameno eniras akcidente inter la du stampojn, sekvas entranĉo > misstampo.

fenditaĵo: se la materialo de la lameno estas malbonkvalita, la lameno povas esti splitata. Kio restas, estas pli maldika kaj malpeza. Sur la fendita flanko la stampo estas apenaŭ videbla > misstampo.

forŝovita trueto: antaŭ ol certaj lamenoj estas stampataj, centra trueto estas traborata. Se ĝi ne troviĝas komplete centre, forŝovita, ovalforma trueto estiĝas > misstampo.

kaskedeto: ŝvelaĵo sur monero, por kiu estis uzita tro granda lameno > misstampo.

mispeza monero: se tro (mal)dika lameno estis uzita, la pezo estos malĝusta laŭ la protokolo oficiala > misstampo.

misstampo: ne celita produkto aŭ produkteraro dum stampado de moneroj. Koncerne monerojn tiaj eraroj estas neregulaj, tial tiaj moneroj iĝas unikaĵoj. Nur malofte misstampoj estas menciataj en katalogoj, ĉar ĉiu monero povas havi iun ajn eraron.

sentruaĵo: se oni antaŭ la stampado forĝesis truigi la lamennon, la rezulto estas monero sen centra trueto > misstampo.

stamporompo: kiam la stampo akcidente rompiĝas, estiĝas fajnaj linioj tra la bildo de la monero > misstampo.

turnita stampo: kutime la du stampoj de ambaŭ flankoj troviĝas en inversa situo. Sed, se ne tute perfekta estas la pozicio, la rezulto estas parte deturnita monero. Tia tordita monero estas priskribita laŭ gradoj de devio. Ekzemple kvarturniĝo ricevas la mencion 90% > misstampo.

NUMISMATIKA FORUMO

“ARTEFARITA LINGVO” LAŬ KOMENIO



La rapidega evoluo de la natursciencoj en la dek-sepa jarcento montris la mankojn de la ĝis tiam universala scienca lingvo, la latina, kiu ne plu estis kapabla esprimi novajn pensojn kaj terminojn. Paralele kun la estiĝo de novepokaj ŝtatoj oni komencis apliki la popolajn lingvojn en la sferoj de la homa scio.

Malgraŭ tio, la manko de komuna lingvo estis senĉese sentata. Krei tian lingvon klopodis i.a. F. Lodowick (en 1652) kaj Dalgarno (en 1661). La unua tiel detalis la esencajn trajtojn de sia verko: *“La lingvo, destinita por ĝenerala uzo, estu kiel eble plej facila por lernado. Tial ĝi evitu malregulecon.”*

La ideo anstataŭigi la “naturajn” lingvojn per pli perfekta kaj racia alternativo okupis ankaŭ René Descartes (1596-1650): *“Tiu lingvo havus nur unu specon de konjugacio, deklinacio kaj vortkonstruo...”*

La vojon al universala lingvo montris la filozofo Leibniz (1646-1716), alia elstara samtempulo de Komenio. Ĉiuj manuskriptoj de tiu ĉi filozofo rilate la mondlingvan problemon ampleksas proksimume mil paĝojn. Laŭ li universala lingvo *“ne malpli servos entuziasmigi la racion ol la teleskopo servas por plifortigi la okulon”*.

Tamen la abstrakteco kaj la teorieca karaktero de tiutempaj provaj lingvosistemoj estis la ĉefaj obstakloj por ilia praktika apliko.

En la deknaŭa ĉapitro de **"Via lucis"** (Vojo de lumo), Komenio menciis universalan lingvon kaj ties neceson. La aŭtoro postulis, ke inter pedagogoj restu konservitaj la hebrea, greka kaj latina lingvoj, kaj ke la nacioj konservu al si kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn. En la

verko li esprimis la deziron pri **lingvo tute nova**, kiu estus pli facila, pli agrabla, pli perfekta ol ĉiuj aliaj lingvoj.

En "**Panglotio**" (Universala lingvo) Komenio per specimenoj vidigas, kiel li imagas la strukturon de la nova lingvo. Tiuj specimenoj estu du - specaj. Plejofte prenas Komenio kiel bazon vortojn latinajn kaj demonstras per ili, kiel artefarita lingvo simpliĝus kompare la komplikecon kaj neregulecon de la konataj lingvoj; sekve li prenas kiel specimenon vortojn novajn, kreitajn laŭ liaj principoj.

Kiel specimenon de la grupo, en kiu Komenio demonstras proponojn sur bazo de materialo latinlingva, ni prenu la verbon **e s t i**. Verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Tio estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn? Por indiki la personon sufiĉas simple la pronomo. Ni prenu la radikon de la latina verbo **e s s e > e s**; ni konjugacias simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon:

mi estas (sum) > e g e s / ni estas (sumus) > n o s e s
ci estas (es) > t u e s / vi estas (estis) > v o s e s
li estas (est) > i l l e s / ili estas (sunt) > i l l i e s

Tute analogie oni povas simpligi la deklinacion. Sufiĉas koni la deklinacion de la pronomo **quis**. Ĝiajn kazoformojn oni simple aligadas al la vortradikoj; tiel la deklinacio rilatas nur la pronomon kaj fariĝos unu-forma.

Akuzativo, instrumental kaj vokativo ne estas bezonaj. La deklinaciajn finaĵojn formas la vokaloj **i, e, a, o**. Ĉe adjektivoj estas ankaŭ senutilaj klopodoj pri deklinacio kaj diferencigo laŭ la sekso. Sufiĉas nedeklinaci eblaj partikuloj, tiel same, kiel oni metas adverbojn al verboj. Ankaŭ la numeraloj havas nek genron, nek nombron.

Ekzemplojn de la dua grupo, en kiu la specimenoj ne estas prenataj el latina materialo, sed elektataj laŭ novaj principoj, ni prenas el suplemento de "Panglotio": "**Provo pri nova harmonia lingvo**". La pronomoj ne estas prenataj el la latina; sufiĉas kvar sonoj: mi - **o**, ci - **e**, li - **i**. Por esprimi la pluralon oni ne bezonas novajn pronomojn; kial do ne procedi egale kiel ĉe la aliaj vortoj? Oni aligu simple finaĵon de la pluralo-**n**. Tiam estas: mi - on, vi - en, ili - in.

Ilia deklinacio estas tre simpla:

O (mi): oi oe oa oo
On (ni): oni one ona ono
E (ci): ei ee ea eo
En (vi): eni ene ena eno
I (li, ŝi, ĝi): ii ie ia io
In (ili): ini ine ina ino

Konforme al pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj. Ekzemple se "**el**" signifus "dio", ĝia deklinacio estus jena (singular kaj pluralo):

el > eli ele ela elo
elon > eloni elone elona elone

Se estus kreita vorto **e l a** (diino), ĝi estus deklinaciata jene: elai (elani), elae (elane), elaa (elana), elao (elano).

En “Provo pri nova harmonia lingvo” Komenio jene efektivigas konjugacion de 1a verbo e s t - i (ban), sen la helpo de la latina (a - mi, e - ci, i - li; pluralon esprimas longigo; **a** - ni; **fa** - futuro, **pa** - preterito):

Prezenco

bana bane bani / baná bane baní

Preterito

pabana pabane pabani / pabaná pabané pabaní

Futuro

fabana fabane fabani / fabaná fabané fabaní

Sumigante konkludas Komenio: **Nova lingvo devas esti tiom racia, harmonia kaj esence ĉioscienca, ke iu ĉiosciulo sukcesus ĝin renovigi, se ĝi estus perdiĝinta.** Ni tamen ne havas la “pansofion” kaj tial ni ne povas renovigi tiun nefinitan lingvon. Komenio mem starigis la samajn principojn en “**Panglotio**” kaj en “**Provo**”, sed li prezentis al la leganto siajn pensojn por primedito. Hodiaŭ jam al neniu venos ideo konstrui artefaritan lingvon laŭ skizoj de Komenio. Sed la sorto, kiu tiomfoje trafis lin maljuste, maljustis al li ankaŭ per tio, ke lia “**Panglotio**” restis dum jarcentoj perdita.



Rimarko: en la dua numero de jarkolekto 10 ni prezentos la priskribon de ege bela ora medalo pri Komenio.

Bibliografio:

Antonio De Salvo: “Jan Amos Komensky – traduketo el *Via Lucis* kaj bibliografio

La Spesmilo revizitata

Terry Watts

KIAM en 1907 oni unue proponis la ideon de Esperanto-mono, la valutoj de multaj landoj baziĝis je oro – la mon-unuo estis difinata kiel egala al certa pezo de pura oro.

Tiel, iasence la mondo jam havis internacian monon, almenaŭ ĝis tiu grado, ke kiu ajn de la tiam cirkulantaj or-enhavaj moneroj havis fiksitajn kaj facile rekoneblajn valorojn en alia lando.

Tamen, oni proponis la Spesmilon. Tiun monon, ne-surprize, oni ankaŭ difinis surbaze de oro. La specifigo estis tia ke, en ekvivalento je oro, 10 Spesmiloj egalas 1 Britan Suverenon.

Do, kiom valoris tiam unu Speso? Nu, la Spesmilo valoris je dekono de pundo, do 2 ŝilingojn aŭ 24 malnov-pencojn. Tiel unu Speso = 24/1000 malnov-pencojn, do proksimume 10 spesoj = 1 fartingon, aŭ kvaron-malnov-pencon.

Tio unuavide ŝajnas absurde eta monsumo por la Speso, sed pensu, ke antaŭ la Unua Mondmilito unu pajnto da biero kostis nur 3 malnov-pencojn (3d). Tiel por unu pajnto da biero vi estus elspezinta 125 Spesojn.

Kiom kostus hodiaŭ tiu biero en Spesoj? La or-enhavo de la Suvereno (la moneroj ankoraŭ elstampiĝas ĉe la Reĝa Stampejo en Kimrujo) valoras proksimume £230. Tiel unu Spesmilo = £23, kaj unu Speso 2,3 nunajn pencojn – kaj (tamburado!) se oni prenas la koston de pajnto da biero je £3, tiam hodiaŭ via biero kostus 130 Spesojn.

Ĉu ne eta miraklo, kiam oni konsideras la

inflacion (mon-valor-perdiĝon) kiun oni spertis en Britio ekde 1907. Kaj ĉu ne argumento por revivigi la Spesmilon?

Kompreneble, se oni elektus alian varon por fari komparon inter la tiama kaj la nuna prezo en Spesoj, oni eble ricevus alian rezulton. Estas multaj faktoroj, kiuj havas influon sur la koston de specifa varo – ŝanĝoj en teknologio, en la produkto-metodoj, en la proporcio kiu estas labor-kosto, ktp.

Sed ĉu vi povas trovi modernan valuton, kiu ne perdis enorme sian valoron de kiam proponiĝis la Spesmilo?

Eble vi krios ke la prezo de oro estas mem ne-stabila, do tiel or-bazita valuto same ne estus stabila. Kaj vi pravus, ke ekde 1971, kiam oni fine rompis la ligan inter oro kaj la dolaro kaj ĉiuj valutoj 'ekfloris', la prezo de oro en dolaroj kreskis forte. Tiam \$35 por unco, nun \$1300.

Sed jen filozofia problemo: ĉu oro plivalorigis aŭ ĉu la dolaro senvalorigis?

Indas re-legi la sagajn vortojn de la ekonomikisto David Rikardo, kiu jam en 1817 diris 'La sperto ... montris, ke nek ŝtato nek banko iam havis la liberan povon eldoni paper-monon sen fi-profite de tiu povo'. Por ĝisdatigi tiun penson oni devus etendi ĝin al la kreo de elektronika mono, sed la principo restas.

Sed ĉu la esperantistoj povus realigi orbazitan monon, do revivigi la Spesmilon? Jes, kaj tio estus multe pli simpla ol vi eble imagus. En sekva artikolo mi esploros tiun temon, kaj montros kiel procedi. ■

RETPOŜTO

De vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

07 10 2022 12:10

Kara Jozefo,

Jen denove post tri monatoj iom da pluslaboro por vi. Mi esperas, ke la legado por vi ne nur estos penado.

Tutkore mi antaŭdankas vin.

Bert

11 10 2022 10:18

Kara Bert,

jen la nova numero de nia revuo kun miaj rimarkoj kaj sugestoj.

Kiel ĉiam, ĝi enhavas riĉajn kaj interesajn informojn. Sed mia devo estas kritiko, do por mi plej gravas la lingva nivelo de la revuo. Tial permesu rimarketon krom kiujn mi faris intertekste. La influo de la angla multe efikas ankaŭ al Esperanto, interalie ĝia ortografio. Ĉiam pliofte mi vidas, ke komunaj nomoj estas skribataj majuskle sen ajna kialo. Mi kredas, ke ni devas resti ĉe la bona, maljuna Zamĉjo.

Kun amikaj salutoj kaj bondeziroj:

Jozefo



14.10.2022 15:35

Kara Bert!

Dankon pro tiu plej freŝa numero.

Paĝo 35: „antaŭ la Okcidenta areo.“

Eble devus esti „erao“?

Amike salutas

Walter Klag



14.10.2022 16:20

Saluton Bert

Elkoran dankon pro la nova numero.

Ĝi jam troviĝas kune kun la aliaj en la kolekto de Vikiflandrio.

[ena-j9n4-202204.pdf \(alcl.be\)](#)

Elkorajn salutojn

Albert

[vikiflandrio.alcl.be](#)



14.10.2022 16:39

Kara Bert,

Koran dankon pro plia interesege numero! La kovrilo aparte interesis min ;-)) Mi dume nur rapide tralegis la enhavon sed jam detale legis pri la romia monero je Brutus, nekredible!

Amike,

James



18.10.2022 11:27

Kara Bert, kore mi dankas por la sendita ENA-revuo, kiu estas – kiel ĉiam – tre interesa. Mi estis surprizita, kiam mi vidis medalojn kun portreto de mia E-amiko Vlastimil Kočvara. Li estis ĉefo de ĈEA, en 1996 li estris komitaton por prepari la 81a UK en Prago - mi estis ano de tiu ĉi 15-kapa komitato. Fartu bone - amike

Josef Kříž

21.10.2022 16:36

Kara Josef,

Multan dankon pro via reago kaj pro via pozitiva komento! Kun plezuro mi povis bonvenigi Vlastimil kiel 155-a ENA-membro, kiu tuj ekkunlaboris.

Dankon ankaŭ pro la kortuŝa historio pri la vivo de Vlasta, vere neordinara virino kiu meritis ne tiel tragedian vivon. Bedaŭrinde ŝi ne ankaŭ estis samideanino!

Amike kaj numismate,

Bert



19.10.2022 11:55

Kara Bert,

Kaptis mian atenton la enigmoj pri la medalo priskribitaj sur paĝo 13 de via revuo. Estas ja preskaŭ nenia informo, kiu ne trovas iom da plia klarigo en la interreto. Mi ne jam havas solvon por unu el la demandoj, sed mi malkovris ke en la franca urbo Amiens ekzistas

juvelistejo, en kiu iu Achilles Flinois verkadis inter 1890-1912: <https://flinois1739.com/histoire/>. Ĉar la juvelistejo ekzistas ĝis hodiaŭ, eble iu tie povas trarigardi la arĥivojn de la firmao por vi.

Amike,

Christoph Klawe

19.10.2022 12:20

Kara Bert,

Kaj jen fotoj el la laborejo.

Kun koraj salutoj,

Christoph

<https://www.geneanet.org/cartes-postales/view/5977580#0>



19.10.2022 22:11

Kara Christoph,

Vi sukcese por mi malfermis pordon al klarigo de almenaŭ unu enigmo de la belega plako el la laborejo de Achille Flinois. Multan, multan dankon! Nun mi povas malfermi alian pordon, ĉar montriĝas, ke la firmao ankoraŭ aktivas en la sama fako.

Kore kaj numismate,

Bert

19.10.2022 22:11

Kara Bert,

Ĉu vi telefonos kun la juvelistoj en Amiens?

Kun koraj salutoj,

Christoph

20.10.2022 11:00

Kara Christoph,

Kiel nederlandlingva belgo, kiu profesie instruis la germanan kaj preferas Esperanton, mi posedas nur bazan mastreton de la eleganta lingvo de Molière. Do per la helpo de mia vortaro mi plejeble simple verkos retan leteron. Tiel mi krome havos la avantaĝon povi kunsendi bildojn de la objekto mem kaj de la koverto.

Mi nur esperas, ke iu afablul(in)o en la firmao akceptos pluslaboron per serĉado en la arkivoj. Ne estas evidente, sed jes estas eble. Jen la taktiko de amatora esploristo...!

Mi certe sciigos la (eventualajn) rezultojn al vi. Tion vi sendube meritas!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.10.2022 11:21

Bert,

Mi legis la artikolon en ENA-revuo pri la medalo farita de Witterwulghe.

Mi (komputile) traserĉis la numerojn de Belga Esperantisto por eble ion trovi pri la mendo de la medalo, sed estas dekoj da revunumeroj en kiuj estas mencio de iu medalo, tro multe por ĉion detale rigardi. Mi aldonas unu mencion pri 'Liga Medalo' el 1957 (mi ne memoras ĉu mi iam vidis tian medalon). Eble estas mendita granda kvanto antaŭ la milito kaj la teksto estis aldonita nur je transdono al iu persono. Tio klarigus la uzon de iom eksmoda artodéco-medalo en la 1960aj jaroj.

Venontan vendredon mi prelegos pri flandra eo-heredaĵo dum la AMO-konferenco. Mi ankaŭ mencias la ENA-revuon kiel informilon.

Mi demandas min ĉu utilis fari alfabetan indekson (regule ĝisdatigotan) kun ĉiuj objektoj kaj nomoj menciitaj en la tuto de la ENA-revuo. Tio faciligus serĉadon. (Aŭ io tia eble jam ekzistis, sen ke mi scias...)

Roland

21.10.2022 16:09

Saluton Roland,

Multan dankon pro la informoj kaj la klarigo pri la eksmoda stilo de la ligo-medalo. Ĉi-sube la aspekto kaj priskribo de la jubilea medalo el 1955 (vidu en jarkolekto 8, numero 3), kiu ne estas konektita al la medalo de Witterwulghe.

Amike,

Bert



04.11.2022 11:24

Kara amiko,

foliumante en la jam aperintaj numeroj de Esperanta Numismatiko mi trovis en la n-ro 3 de la jk. 2017 informon pri la medalo de J. Hrcuba. La teksto enhavas kelkajn malprecizaĵojn kaj krome necesas ankaŭ iom klarigi la fonon de ĝia apero. La medalo ne estis jubilea, ĝi havis tute alian celon. Por klarigi mi devas reveni iom en historio de la movado.

Komence da la 20-a jarcento la esperantistoj komencis renkontiĝi, ekde la unua Universala Kongreso en 1905, sed ankaŭ nacie en naciaj kongresoj. En la Habsburga monarkio okazis la unua nacia kongreso en la jaro 1910 en Vieno, la 4-a efektiviĝis en la jaro 1914 en banloko Francesbad, nun Františkovy lázně en Ĉeĥio. Antaŭ la kongreso la prezidanto de la loka Esperanto-societo J. Hechtl iniciatis starigi monumenton honore al la aŭtoro de Esperanto. La monumento estis inaŭgurita ĝuste dum la kongreso. Ĝi estis la unua monumento dediĉita al Zamenhof en la mondo. La monumento staris en urba parko ĝis la jaro 1939, kiam nazioj ĝin detruis. Post la dua mondmilito reviviĝis inter ĉeĥoslovakaj esperantistoj la ideo denove starigi la monumenton. Nur post apero de Ĉeĥa Esperanto Asocio oni serioze ekinteresiĝis pri ĝi planinte inaŭguri ĝin en la jaro 1992. La asocio petis sian menbron, akademian skulptiston J. Hrcuba fari modelon de nova monumento, kion li akceptis. Sekve oni konstatis, ke la financaj kostoj por realigo superas aktualajn eblecojn de la asocio kaj tial estis alvokita monkollektado subtene al la monumento. Tiucele la aŭtoro de la monumento preparis medalon similforman al la planita monumento kaj kontribuanto, kiu donacis iom grandan monsumon –

temis pri kelkmiloj da kronoj - ricevis la tiucele presitan dankdiplomon kune kun la medalo, sur kiun estis gravurita la nomo de la donacinto. Ĝenerale ne estis la medalo aĉetebla. Tial ĝenerale ekzistas medaloj sen algravurita nomo nur kiel historia artefakto. Sur aliaj estas la nomo de la donacinto. Kiom oni tiamaniere gajnis, mi jam ne rememoras, sed ĝis la planita starigo la kolektita monsumo ne sufiĉis kaj poste la nova komitato de la asocio la ideon de nova monumento forlasis.

Mi aldonas, ke okaze de la origina inaŭguro en la jaro 1914 aperis ankaŭ insigno en formo de ordeno, kiu nun estas ege rara. Dua noto estas, ke ĈEA eldonis al la jubileo de Esperanto medalon de J. Harcuba, sed tiu estas alia ol ĉitie priskribita. Pri ĝi iam venontletere.

Mi sendas korajn salutojn kaj antaŭĝojas je pluaj numeroj de EN.

Amike

Vlastimil Kočvara



16.11.2022 10:37

Saluton, kara s-ro Gebruiker,

Ni multe dankas vin pro via partopreno en la 89a DK kaj klariga parolado pri numismatiko!

IKEF ankaŭ celas progresigi kunlaboradon inter fakaj asocioj. Ni kun granda ĝojo invitas vin prelegi pri via asocio. Kiam vi eblus prelegi? Ĉu en la 90a DK la 20an de novembro aŭ iom poste?

Amike,

Enkhee, Ĝenerala sekretario de IKEF

16.11.2022 14:03

Saluton kara samideano Enkhee,

Mi ĝojas pro via mesaĝo kaj tutkore dankas vin kaj vian asocion pro via invite baldaŭ prelegi pri esperanto numismatiko.

*(Permesu, ke mi unuavice klarigas miskomprenon. La nomo sub mia ekraneto dum la kunveno "gebruiker" signifas en mia propra lingvo "uzanto" (de Zoom). Mia oficiala antaŭnomo estas **Bert**, mia familinomo **Boon**.)*

Post nia Zoom-renkontiĝo mi preskaŭ tuj komencis kompili novan, pli aktualan prelegon pri la de vi proponata temo. Tio evidente kostos kelkajn semajnojn por la finpreparado kaj la testo.

Do, eblas nur prelegi per Zoom post la komenco (januare-februare) de la nova jaro 2023.

Kiam ĉio estos preta, mi tuj sendos al vi mesaĝon por ke vi povu fiksi definitivan daton. Ĉu tiel konsenteble por vi?

Preparante la novan prelegon mi bedaŭrinde devas konstati, ke ĝis nun mi havas multajn ĉinajn filatelajojn sed neniun ĉinan esperantan medalon!!! Mi nur vidis dum la kunveno medaleton ordenaspektan por ĉinaj veteranoj. Ĉu vere (esperantaj) medaloj en via kulturo ne estas popularaj?

Nu, mi deziras kaj intencas aldoni al mia prelego almenaŭ tiun veteranan medaleton, sed en tiu kazo mi bezonas bonkvalitan foton kaj informojn esperantigitajn pri la evento, la mezurojn, la pezon, la nomon de la medalisto ktp (vidu en la aldonita revua numero en la rubriko "Moneroj & medaloj").

Mi antaŭdankas vin pro ĉio kion vi povos sendi al mi informcele en via responda mesaĝo..

Amike kaj numismate,

Bert



27.11.2022 16:57

Saluton karaj geamikoj,

esperante, ke vi ambaŭ fartas bone, mi petas vin se eble pripensi mian jenan proponon.

Sendube vi konas "Mercy ships". Mi private jam kelkajn jarojn finance subtenas la projektojn de tiu samaritaneca medicinista organizo. Mi nun proponas al vi kaj al UMEA krei en la sino de nia fakgrupo projekton por subteni finance la ĵus konstruitan, duan ŝipon. Kiel iniciatinto de ENA mi evidente preferus eldoni kaj profitcele vendi medalon kun tiucela aspekto por poste (post rericevo de la kostoj) povi donaci la profiton de la vendado al "Mercy ships". Tia medalo krome taŭgus kiel reklamilo, ne nur por tiu korfavora internacia projekto, sed ankaŭ por la agado kaj la karismo de UMEA mem kaj por...Esperanto!

Provizore mi – tute nedevige – propones konkrete ekzemple tian aspekton:

Averse: supre la surskribo "Mercy Ships", meze bildo de unu el ambaŭ ŝipoj, sube "Samaritanaj Ŝipoj".(aŭ aliaj...) kaj la jarindiko 2023.

Reverse: supre, U.M.E.A.; meze la blazono de UMEA, sube UNIVERSALA MEDICINISTA ESPERANTO-ASOCIO.(aŭ aliaj).

Mi supozas, ke en via lando la financa kompensaĵo por medalistoj estas malpli alta ol en Belgio, sed se vi tion dezirus, mi pretas peti prezoprojekton ĉe medalisto kiu lertege kreis medalon por nia loka Esperanto-grupo.

Se vi decidus disvastigi mian mesaĝon al niaj grupanoj, mi estus je via servo por eventuale antaŭe sendi al vi esperantlingvan artikoleton pri "Mercy Ships" kiel aldonon...

Amike kaj numismate,

Bert

28.11.2022 18:38

Kara Bert!

Tutkore ni gratulas Vin pro Via partopreno en la samaritaneca, medicinista agado.

Ĝi estas elstara, tial bonvolu dissendi Vian peton kaj proponon helpe de nia mondkalalisto medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com .

Pacajn Festojn deziras

plejamike

Ludoviko kaj Julinjo

08.12.2022 11:45

Karaj gesamideanoj-medicinistoj,

Mi petas vin trarigardi la suban teksteton kun propono pri subteno de grava internacia medicinista projekto, kiun mi unuavice sendis al Ludoviko kaj Julinjo. Gravas por mi viaj reagoj, pozitivaj aŭ negativaj, eventuale pri strategio, iniciativoj por konkretigo ktp.

Amike,

Bert Boon en la nomo de ENA



17.12.2022 8:58

Kara Bert, mi forte miras ĉiufoje kiam mi vidas vian revuon, ke en ĉi tempo vi kiom dense kapablas krei vian revuon. Akceptu la esprimon de mia miro kaj kontento. Gratulojn!

Agrablan Kristnaskon kaj novan sukcesoplenan jaron mi deziras por vi por 2023, por la mondo-pacon, antaŭ ol en Ukraino.

Amike:

Adri Pásztor

17.12.2022 14:34

Kara Adri,

Multan dankon pro via aprecio de nia revuo. La kialo de la ampleksa enhavo estas la historie riĉa disciplino nomata "numismatiko". Aliflanke montras la jam naŭ jarkolektoj, ke la lasta informo pri la ĝis antaŭ dek jaroj "forĝesita" Esperanto - numismatiko ne jam estas malkovrita, male.

Tamen la revuo ne dependas nur de la laboro de unu persono. Multaj membroj kaj eĉ ne-membroj alportas informojn, ĉu memvole ĉu post peto al ili. Krome, nia provleganto, Jozefo Horvath kaj mia propra edzino, kiu ne nur tajpadas sed ankaŭ aranĝas la paĝojn, estas nemalhaveblaj helpantoj.

Mia stato de pensiulo donas al mi la eblecon serĉi kaj pristudi diversajn temojn rilate al la ĝenerala tutmonda numismatiko kaj al la esperanto sekcio, vere grava aspekto de la esperanta kulturo, antaŭe malprave tute mistaksita.

Jen do konciza respondo je viaj interesaj rimarkoj.

Al vi, kara amikino, mi reciproke deziras agrablajn festojn kaj pli bonan novan jaron ol la mizeran 2022an por multaj homoj en kaj ekster Eŭropo.

Tutkore,

Bert



A N O N C O J

&

E V E N T O J



Novajletero de la 1a de decembro 2022

Ĉu falsaĵo aŭ ne?



Unu el la moneroj kun portreto de iu enigma imperiestro "Sponsianus", kiu estas certe aŭtentika

Ekde la 18a jarcento oni sin apogis sur la supozo, ke tiu imperiestro estas fikciita persono, sed aktuala pristudado sugestas nun, ke li eble vere ekzistis, kaj ke li en la 260aj jaroj imperiis en la romia provinco Dacio.

La koncernaj moneroj estis trovitaj en 1713 en Transilvanio, regiono kiu grandparte en la dua kaj en la tria jarcentoj de nia erao apartenis al la romia provinco Dacio.

Kvar ekzempleroj montras portreton kun la surskribo "IMP SPONSIANUS" (IMP = imperiestro). Kvankam tiuj oraj moneroj tre similas al romiaj "aurei", ili tamen montras diversajn anomaliojn. Ekzemple, la portreto estas maldelikate ellaborita kaj la epigrafoj estas neglekteme gravuritaj. La konkludo de la tiamaj fakuloj estis, ke temas pri malbonkvalitaj falsaĵoj por trompi kolektantojn.

Novaj aktualaj esploradoj en la University College London prilumas, ke la moneroj tamen devenas el la tria jarcento, kiel anoncas artikolo en la dekolegoj kontrolita revuo PLOS One.

Scienculoj pristudis kvar orajn monerojn el la sama trovaĵo, el kiuj unu kun la portreto de Sponsianus. Ili observis ilin per fortegaj mikroskopoj kun videbla lumo kaj kun ultraviola lumo. Krome per diversaj spektroskopaj teknikoj. Fine sekvis kemia analizo. La samajn observojn ili ripetis ĉe du aliaj romiaj moneroj, kiuj estas konsiderataj tute aŭtentikaj.

Jen kelkaj surprizaj rezultoj. La scienculoj rimarkis spurojn de eluziĝo kiel sur moneroj, kiuj longtempe cirkulis. Sekve ili trovis sur la moneroj mineralojn, kiuj estas tipaj por moneroj kiuj dum multaj jarcentoj kuŝis en la tero kaj subite estas metataj en aeran medion. Do, ili devis konkludi, ke la monero estas aŭtentika, kaj ke iam ekzistis iu imperiestro Sponsianus. Tamen, ĝis nun, neniu historia fonto, krom la oraj moneroj mem, mencias la ekziston de tiel nomata imperiestro.

*La aktuala klarigo de la sciencistoj estas, ke **probable** temas pri iu arma komandanto en la provinco Dacio. Tiu regiono (aktuale grandparte en Rumanio) en la jaro 103 estis aneksita de la Romia Imperio. La okupado por la romianoj kaŭzis multajn problemojn, sed la imperiestro en Romo tute ne volis perdi la regionon pro la multaj orminoj. Tial tien estis senditaj multaj militistoj...*

Fonto: "PLOS One"

108° Congresso Universale di Esperanto

Torino - Italia, 29 luglio - 5 agosto 2023



“GLORIA ARTIS”: POLA MINISTERIA MEDALO POR ROMAN DOBRZYŃSKI



Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA), en la 10-a de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “**Gloria Artis**”. En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson, en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetararo. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo.

Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de “Kontakto” (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e “Bona Espero” (1984). Jam en 1980 la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicist pri internaciaj aferoj. En 1995 li cetere iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”, de BBC. Li estas membro de UEA ekde 1961 kaj estis komitatano kaj vicprezidanto de UEA (1989-92). Li kontribuis al la establo de Fondumo Zamenhof kaj estis ĝia unua prezidanto. En 2003 aperis lia libro “L.Zamenhof-strato” pri interparoloj kun D-ro L.C.Zaleski-Zamenhof, sekve tradukita en multajn lingvojn. En 2005 li estis elektita Honora Membro de UEA kaj ricevis la unuan premion de la Fondaĵo Grabowski pro siaj esperantlingvaj filmoj kaj la verko “La Zamenhof-strato”.

Dobrzyński estas elstara ĵurnalisto kaj poligloto, ĝis nun - 85-jaraĝa - tre aktiva sur diversaj kampoj rilataj al Esperanto, internacia kunlaborado kaj ĵurnalismo. En interkonsento kun Bjalistoka Esperanto-Societo estis decidite, ke taŭga okazo por enmanigi la medalon al Dobrzyński estos la 23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj < <https://eventaservo.org/e/bjalistoko-2022> >. La solenaĵo okazos la 10-an de decembro en Bjalistoko kaj la medalon transdonos la vojevodo (provincestro) de Podlaĥia Provinco, S-ro Bohdan Paszkowski. UEA gratulas al Dobrzyński pro la meritplena honorigo kaj invitas ĉiujn partopreni en la evento, ĉeeste aŭ rete.

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 157 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be